



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 8
1965

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
31-a (37-a) jaro
Monata

LA LANDA KUNVENO

de NEL en Oslo la 20-an de junio 1965

La landa kunveno ĉi tiun fojon okazis dum la Nordlanda Esperanto-Kongreso en Oslo.

TAGORDO

1. Malfermo per la prezidanto, s.ro C. Støp-Bowitz, kiu salutis la kunvenantojn kaj mallonge menciis la diversajn gravajn okazintaĵojn dum la pasintaj 2 jaroj. Li ankaŭ memorigis pri kelkaj membroj forpasintaj post la lasta jarkunveno en Stavanger 1963, Nils Rønningen, Lillehammer, Ole Brochmann Sletterød, Oslo. M. A. Halsbog, Bolsøya, Maria Fjærem, Oslo, Didrik Didriksen, Lillesand, Harald E. Hansen, Bergen, Esther Grønneberg, Oslo, Alfred Berntsen, Kristiansand, Johan Sandersen, Halden, Nils Arvesen, Oslo, Ottar Aas, Oslo.

La kunveno honoris ilin per mallonga silento.

2. Elekto de kunvenaj funkciuloj. Elektiĝis protokolantoj T. Arbo Høeg kaj Jan O. Ekhaugen; kunvena prezidanto Kjell Gustavsen, kaj elekta

komitato: Olav Thormodsen, Harda Danielsen, kaj Lars K. Hunnes; kiel komisiono de plenrajtoj estis elektataj s.ino Sivertsen kaj s.ro Aasheim. La kontrola komisiono poste prezentis raporton, kiu montris jenajn reprezentantojn:

Konsilantaranoj:	No. da voĉoj:
C. Støp-Bowitz	1
Ludvig Anjer	1
Tom Arbo Høeg	1
Signe Haug	1
Karl Ekhaugen	1
Jan Ekhaugen	1
Harda Danielsen	1
Kjell Gustavsen	1
Bergen	6
Gjøvik	2
Haugesund	9
Jørpeland	2
Kristiansand S.	4
Oslo	30
Skorovatn	2
Skudeneshavn	2
Trondheim	9
Entute	74 voĉoj

3. Jarraportoj 1963 kaj 1964: T. A. Høeg, L. Anjer kaj C. Støp-Bowitz laŭtlegis la jarraporton por 1964, dum la reprezentantoj havis ankaŭ tiun pri 1963 antaŭ si por komparo. Estis preskaŭ neniu diskuto koncerne la jarraportojn. Støp-Bowitz menciis la novan oficejon. N.E.L. daŭre luas la malnovan treege malbelan ĉambron en N. Slotsstgt., sed komencis nun lui ankaŭ du relative grandajn kaj pli belaspektajn ĉambrojn en St. Olavsstgt. 27. Dank' al ĉiumonata ekonomia subteno flanke de kelkaj membroj la luo ne estas tiel granda, ke ni ne povos pagi ĝin. La eldonejo pagos la elspezojn por la malnova oficejo, kaj Klubo Esperantista en Oslo pagos 50 kronojn monate por la rajto havi oficejon en unu el la du ĉambroj.

R. Bugge-Paulsen konstatis ke la estraro bone funkciis dum la lasta periodo; plue ne estis rimarkigoj de la ĉeestantaro.

L. Anjer substrekis la gravecon de efika klublaboro, tiun ĉi grandan problemon oni nepre devas diskuti en la kluboj mem, dum la kongreso kaj en nia gazeto. Post demando de L. K. Hunnes (Tr.heim) Støp-Bowitz mallonge klarigis pri la varba sistemo, kaj li ankaŭ aldonis al la jarraporto ke Hunnes nun ordigis la kliŝan arĥivon de la gazeto.

Karterud (Tr.heim) klarigis pri la situacio de la deviga instruado de Esperanto en Dalen Blindullernejo, kiu nun anstataŭiĝis per libervola posttagmeza instruado.

La jarraportoj por 1963 kaj 1964 estis unuanime aprobatataj.

4. Kalkuloj: La kasisto, Karl Ekhaugen, laŭtlegis la kalkulon pri 1964 dum oni havis la kalkulon de 1963 antaŭ si por komparo. Li klarigis pri la papertranĉiloj, kaj Anjer klarigis pri la kalkulo rilate al la propaganda fondaĵo kaj la loterio. La kalkuloj poste estis unuanime aprobatataj.

Koncerne la kalkulon de la koresponda kurso Anjer menciis, ke oni forgesis la interezojn; Hunnes promesis paroli kun la revizoro pri tio. Hunnes ankaŭ proponis, ke oni unuformigu la respondojn de la diversaj instruistoj. Li ankaŭ rekomendis revizion de la leterkurso.

La kalkulo pri la Koresponda Kurso estis aprobatata.

5. Alvenintaj proponoj:

a) Støp-Bowitz klarigis pri la propono de la kasisto ke oni rondigu la kotizojn, tiel ke rektaj membroj pagu kr. 20,- kaj klubaj membroj kr. 15,-, la propono estis aprobatata sen diskuto.

b) John Berggreen, prezidanto de Kluba Esperantista en Oslo, mallonge priparolis sian proponon pri statutŝanĝo: §10, 1a lineo, sonu: «Forbundet ledes av et Forbundsrad på 12 medlemmer, som velges av landsmøtet for tidsrommet inntil neste ordinære landsmøte, og skal bestå av formann, nestformann, generalsekretær, sekretær, kasserer, informasjonsleder og undervisningsleder samt 5 rådsmedlemmer. De 7 førstnevnte danner FORBUNDSSTYRET. For forbundsstyret velges 3 suppleanter.»

La propono okazigis vigan diskutadon. Unue Støp-Bowitz pritraktis la proponon kaj klarigis la vidpunkton de la nuna estraro. Principe la estraro aprobis la proponon, sed ĝi preferas konservi la ĝisnunan sistemon en la hodiaŭa situacio. — En la longa diskutado partoprenis L. Anjer, f.ino H. Danielsen, s.ino A. Mansrud, Winsnes, s.ino Torgnes, Berggreen, Sivertsen, Støp-Bowitz, Aasheim, Carlsen, K. Gustavsen, Karterud, Dreyer, Dybing kaj s.ino Sletterød. Winsnes proponis jenan ŝanĝon al la propono de Berggreen: «Informasjonsleder og Undervisningsleder skal være medlemmer av styret.»

(daŭr. p. 93)

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo
Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—

Anoncprezoj: $\frac{1}{1}$ paĝo kr. 150,—
 $\frac{1}{2}$ p. kr. 75,—, $\frac{1}{4}$ p. kr. 38,—
 $\frac{1}{8}$ p. kr. 19,—.

Vojaĝante

en fremdaj landoj vi povas propagandi por Esperanto, eĉ se vi ne vojaĝas kiel esperantisto, kiel partoprenanto en esperantaj aranĝoj.

Demandu al la fremdaj homoj ĉu ili parolas Esperanton *unue*, poste vi povos uzi la aliajn lingvojn kiujn vi eventuale scias. La plej multaj al kiuj vi demandas ja bedaŭrinde ne scipovas Esperanton, kaj devas respondi negative, sed per via demando vi almenaŭ atentigis ilin pri Esperanto.

Se vi vizitas turismajn oficejojn aŭ similiajn lokojn, demandu ankaŭ tie ĉu ili parolas Esperanton. Kaj demandu plue ĉu ekzistas broŝuro pri la urbo aŭ loko en la internacia lingvo. Kunportu ĉiam la jarlibron, ankaŭ se vi ne intencas utiligi la delegitan servon dum via vojaĝo. Vi povos trovi okazon montri la jarlibron «hazarde» al neesperantistoj, kiuj ofte tre interesiĝas pri la jarlibro.

Ne estu tro fervora aŭ altruda kiam vi mencias Esperanton, tio nome ofte povas efiki malbone. Menciuj «hazarde», parenteze Esperanton. Se vi vidas ke la homoj interesiĝas, rakontu iom pli pri la lingvo. Kaj se ili demandas al vi diri kelkajn frazojn

(daŭr. p. 92)

Sciigoj de N.E.L.

Kotizoj por 1966. Por eviti interrompon en la liverado de Norvega Esperantisto estas grave ke ĉiuj membroj pagas siajn kotizojn frue. Klubanoj bonvolu pagi al la kluba kasisto, rektaj membroj rekte al NEL, prefere jam antaŭ Kristnasko.

Anoncoj en Norvega Esperantisto. La kotizenspezoj ne sufiĉas por eldoni dek plenajn 16-paĝajn numerojn de Norvega Esperantisto en la jaro. Sed kelkaj anoncoj estus bona helpo. Ni tial petas la membrojn varbi anoncojn por nia gazeto. Vidu la anoncprezojn sur ĉi tiu paĝo.

U.E.A.-kotizoj 1966. Por eviti interrompon en la ricevado de la Jarlibro kaj de la gazeto «Esperanto» ĉiuj Individuaj Membroj de U.E.A. devas nun laŭeble baldaŭ pagi sian kotizon por 1966. Pagu al la loka Delegito aŭ rekte al la Ĉefdelegito por Norvegujo, s.ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118, Oslo-Bryn — poŝtĝirokonto 133.29. Ni rekomendas al ĉiuj membroj aboni la jarlibron kaj la gazeton de U.E.A. La kotizoj por 1966 estas: Membro-Jarlibro kr. 20,-, Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton «Esperanto») kr. 40,-, Membro-Subtenanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton) kr. 60,-.

51-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Budapeŝto 30. julio—6. aŭgusto 1966. Aligiloj estos riceveblaj de la Turisma Servo de NEL, Boks 942, Oslo 1. Pri planoj de komuna vojaĝo ni poste informos.

La nova oficejo. Pluraj mem-

en Esperanto, mi esperas ke en via buŝo la lingvo sonos bele kaj melodie!

Bagatelaj ĉi tiuj proponoj, sed mi estas certa ke agante tiel vi kunhelpas doni al la homoj favoran impreson pri Esperanto, kaj ja kostas al vi neniu laboron, nur iomete da agemo.

(Norvega lingvo) *Elna Matland.*

DONACOJ AL LA KONTORFONDAĴO

Th. Dybing	kr.	80,00
C. S.-B.	»	10,00
Signe Haug	»	35,00
C. S.-B.	»	20,00
T. Raimar	»	300,00
A. Refsing	»	180,00
C. S.-B.	»	10,00
R. Berli	»	12,00
G. Ringstad	»	10,00
N. Dahl Johnsen	»	30,00
Torkildsen	»	5,00
Armanis	»	12,00
K. Offerdal	»	10,00
O. Koren	»	50,00
Olav Olsen	»	30,00
P. Vasmoen	»	100,00
R. Bugge-Paulsen	»	10,35
C. S.-B.	»	10,00
R. Winsnes	»	60,00
Div.	»	7,00
		kr. 981,35

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

Korespondu!

Jam de longe mi tre ŝatus havi korespondadon kun norvega sinjorino. Bonvolu skribi al: s.ino Heleno Acs, Mártirok u. 27, V. 14, *Budapest II*, Hungarujo

25-jara instruisto, filatelisto kaj kolektanto de validaj moneroj, dez. kor. S.ro Bagnis Romano, Saleziani, *Pietrasanta* (Lucca), Italujo.

broj en Oslo promesis monatajn kontribuojn por helpi nin teni la oficejon kiun la ordinara budĝeto ne povas porti, aliaj donacis rondajn sumojn. Ni kore dankas al ĉiuj helpantoj, kaj hodiaŭ publikigas la liston pri la ricevitaj kontribuajtoj. Sed ni bezonas pliajn donacojn: ĉiuj donacoj estos bonvenaj, ĉu ili estas grandaj, ĉu malgrandaj. — La deĵorado okazas nun en la nova oficejo. St. Olavsgt. 27 III, kiel kutime marde kaj vendrede 15.30—16.30. La telefon-n.ro estas: 20 20 83.

Taskotabelo por la kluboj. — *Novembro.* La estraro sendas registritan informon al tiuj membroj, kiuj ne ekzigis laŭ la statuto, sed de kiuj tamen revenis la poŝta enkasigilo sen pago, ke oni nun forstrekos ilin kiel klubanojn. La estraro admonas la klubanojn pagi la kotizojn por la venonta jaro. La Delegito de UEA ekkolektas la UEA-kotizojn por la venonta jaro kaj varbas novajn Individuajn Membrojn de UEA. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Raporto de la Liga Estraro pri la 3a jarkvarono. Okazis 1 estrarkunveno kaj oni elsendis 1 cirkuleron al la kluboj. C. Støp-Bowitz reprezentis N.E.L.n ĉe la Universala Kongreso en Tokio, la norvegan registaron reprezentis R. Bugge-Paulsen. Harda Danielson (kiel anstataŭanto de Anjer) kaj C. Støp-Bowitz partoprenis la Komitatkunsidojn dum la kongreso. Oni planis la utiligon de la rezolucioj de la Nordlanda Esperanto-Kongreso kaj de la U.K. en Tokio kaj la pluan klopodadon por la subskribkampanjo.

La Liga Estraro.

LA LANDA KUNVENO

(daŭr. de p. 90)

Post vigla diskuto oni konstatis ke la ĉeestantaro dividis sin en du grupojn, unu por la propono de Berggreen kaj unu kontraŭ, sed kiu povus akcepti la proponon de Winsnes. Anjer, kiu estas la nuna gvidanto de la Informa Fako, kaj samtempe sidas en la estraro, diris ke lia konkludo estas tute mala al la propono de Berggreen. Li opiniis ke la Inform-Gvidanto ne estu membro de la estraro, sed devus esti vokata al la estrarkunvenoj, sen voĉdonrajto. F.ino H. Danielsen kaj Støp-Bowitz samopiniis kun Anjer. S.ino Mansrud kaj Aasheim varme parolis por la propono de Berggreen. Karterud kaj Snekvik estis por la propono de Winsnes. Okazis longa diskutado ĉu oni rajtas voĉdoni pri la propono de Winsnes ĉar ĝi ne estis ensendita, sed la konkludo estis ke ĝi nur estas ŝanĝo de la ensendita propono de Berggreen, kaj oni tial havis 3 proponojn por voĉdonado.

Oni unue voĉdonis por aŭ kontraŭ la propono de Berggreen, 28 estis por kaj 40 kontraŭ. Ankaŭ la propono de Winsnes falis. Oni nome bezonis 2/3 da voĉoj, ĉar ĝi estas statutŝanĝo. Ĝi ricevis 45 voĉojn por kaj 23 kontraŭ, fakte nur mankis unu voĉo por bezonata plimulto.

c) La proponon de Berggreen ke oni rekomendu al la kluboj ankaŭ trovi lokon por informgvidanto en la klubaj estraroj, oni aprobis sen diskuto.

7. Elektaj. La elekta komitato prezentis la proponon. La vicprezidanto kaj la ĝenerala sekretario rifuzis reelekton.

Sekvis ioma konsiderado de la proponitaj kandidatoj, kaj ŝajnis ke oni ne havas kandidaton por la ĝenerala sekretario, ĉar s.ro Berggreen, kiu

estis proponita, rifuzis. Post longa diskutado oni petis ke Tom Arbo Høeg akceptu reelekton.

Ĉiuj elektoj estis unuanimaj malgraŭ la fakto ke dum la diskuto sub punkto 5b oni tre kritikis la estraron, kaj unu el la ĉeestantoj diris ke ĝi estis miopa.

Jenaj elektigis:

Prezidanto: C. Støp-Bowitz (reel).

Vicprez.: Kjell Gustavsen (nova)

Ĝen. sekr.: Tom Arbo Høeg (reel.)

Sekretario: Signe Haug (reel.)

Kasisto: Karl Ekhaugen (reel.)

Estraranoj: Olav Rygg (reel.)

Jan Ekhaugen (reel.)

Anstataŭantoj:

Harda Danielsen (reel.) Alf Skyberg (reel.), Frank Aasheim (nova)

Konsilantaranoj:

Johs. Flodmo, Mo i Rana (reel.), Finn Hole, Mandal (reel.)

Trygve Kvalvåg, Stavanger (reel.)

Ragnvald Rian, Trondheim (reel.)

Johan Hammond Rosbach, Sarpsborg (reel.)

8. Pro manko de tempo oni forstrekis la temon.

9. Eventualajtoj: Tom Arbo Høeg informis pri la interkonsento kun s.ro E. Grønland, la estro de la Norvega departemento en la Universitata Biblioteko en Oslo, laŭ kiu U.B. senkoste bindigos eventualajn maŝinskribitajn manuskriptojn en Esperanto. Høeg promesis skribi pli detale pri tiu interkonsento en «Norvega Esperantisto».

La prezidanto dankis la funkciulojn de la landa kunveno kaj Anjer, kiu nun forlasas la estraron, kaj bonvenigis s.ron Aasheim. Li ankaŭ dankis al la L.K.K. kaj ĉiuj aliaj kiuj helpis pri la kongreso.

La kunveno sendis florbukedon al Skyberg, kiu estis en malsanulejo.

Jan Ekhaugen Tom Arbo Høeg

RECENZOJ

STAFETO indikas kvaliton

«El Tero kaj Etero», novelaro de Julia Pióro. Eldonis Stafeto. 115-paĝa. Nebindita.

Eldonis Stafeto — tio estas preskaŭ indiko de kvalito. Tiel ankaŭ rilate al tiu ĉi libro: Plaĉa aspekto, bela kaj klara preso kun malmultaj preseraroj. Kaj kiel kutime ĉe Stafeto: Enkondukaj vortoj, ĉi tiufoje de Baldur Ragnarson, kun prezento de la aŭtorino.

Ŝi estas relative nova esperantistino, ĉar tia ŝi iĝis 1956, dum ŝi estas polino ek de 1902. Sed ŝi debutis jam 1958 per novelo en «Pola Esperantisto». Kaj jen ŝi debutas per elektitaj noveloj libroforme.

8 noveloj kun varia literatura valoro, sed ĉiuj kun facile fluanta rakonto, kun inda lingvaĵo. Julia Pióro ŝajne sin tre okupiĝas pri la vivo postmorta — aŭ ĉu ni prefere diru: pri la vera vivo. Tial ŝi en Ruĝa Truto meditadas pri la jam deciditaj linioj de ĉies vivo, en La Vojo pri la danĝeroj de tiu ĉi mondo — kiel ĝi povas veneni kaj subfosi la vivoforton, kaj malebligi al la atingo de la celo. Ŝi substrekas la forton de la amo, sed ŝi tute rifuzas la forton de religio. Plej klare tio montriĝas en Brulruĝo. Tie montriĝas tute nova mondo, la teĥniko kaj la bona volo transigis ĉion, kaj jam oni atendas viziton el alia mondo. Nun la homoj estas pretaj. Sed, kiam alvenas la fremdulo, okazis io, kio igis la direktoron preĝi: «El la profunda mi vokas vin, Sinjoro!» La Marsano ne komprenas liajn vortojn, sed «malklara antaŭsentito» diris al li, ke la Teranoj ne estas pretaj ankoraŭ.

La Tero kaj Etero do estas plene materialisma, sed plena de vivo kaj

amo kaj forto. Kaj, kiel jam dirite, prezentata en plaĉa, ĝuebla vesto, tiel ke aĉetanto neniel pentas sian havaĵon.

Haro

Ĉinaj libroj por infanoj

Hua Gjunvu: La fiera generalo,
Guan Hua: La vulpo,
Jang Gju: La ora hakilo.
Trad.: Laŭlum. Eld.: Ĉina Esperanto-Ligo, Peking, 1964.

Jen tri libretoj kun mallongaj fabeloj por infanoj, kun belaj, ĉinstilaj bildoj multkoloraj. La enhavo estas simpla kaj por infanoj interesa, kun morala fino. La tradukinto bonege regas Esperanton, tiel ke efektive oni ne povas konstati, ke la fabeloj estas tradukitaj el neeŭropa lingvo de neeŭropano, kio estas la plej bona pruvo ke Esperanto estas vere taŭga kaj internacia. Tiel la libroj estus bonvenaj ankaŭ por plenkreskaj esperistoj — kiel interesaj lingvaj dokumentoj favoraj al niaj asertoj.

JHR.

«Sub la ĉielo», kajero 4 en la serio Legu kaj Lernu.

Derrick P. Faux eldonis serion de 6 multobligitaj kajeroj «Legu kaj Lernu». La multobliga laboro estas unuranga, senmakula. La kajeroj tre taŭgas por infanoj kun sia varia enhavo da rakontoj, ludoj, kantoj kaj taskoj. La aliaj kajeroj estas «El Afriko», «Idetoj» kaj «Vortludoj». — Prezo po 3 steloj.

Haro

Geografia Revuo

De tempo al tempo aperas numero de Geografia Revuo, la organo de Internacia Geografa Asocio. Ĝia redaktoro estas Tibor Sekelj, kaj la adreso Poŝtfako 213, Zagreb, Jugoslavio. Oni klarigas, ke la neregulan aperon de

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

Klubo Esperantista en Oslo.

2/9. La prezidanto John Berggreen malfermis la kunvenon kaj deziris bonvenon al la ĉeestantoj. Li esperis ke ili pasigis agrablan someron malgraŭ la pli aŭ malpli bona vetero.

Oni komencis per kantado de la Kluba Marŝo, akompanita per piano de Aslaug Refsing. — La prezidanto donis superrigardon pri la labortaskoj aŭtune, interalie li informis ke de la 7. ĝis la 12. de septembro estos prezentota La Migranta Ekspozicio de UEA en Stortingsgt. 28 (ĉe Saga kinejo). Kune kun la ekspozicio estos «Kafoburso» kaj «Dek sur pinto» — por kovri la elspezojn. Plue, estos okazo anonci sin al la aŭtunaj Esperantokursoj, subskribi la petskribon al UNO kaj partopreni demandkonkurson kun premio.

La ĉefpunkto de la programo estis prelego de C. Støp-Bowitz pri «La Esperantokongreso en Tokio kaj aliaj impresoj pri Japanujo» — kun kolorlumbildoj. — Kun granda intereso la membroj sekvis lin dum la vojaĝo de Oslo al Stockholm, Helsingfors, Moskva, Khabarovsk, Nahodka, Yo-

la revuo kaŭzas la fakto, ke la abonantoj estas nur 300, la revuo ne havas financan subtenon, kaj ĝi devas sin apogi sur anoncoj. La revuo tial forte deziras multajn abonantojn. La abonprezo por 4 numeroj estas 1 usona dolaro. Oni abonas per UEA.

La enhavo ĉiam estas interesa. Ni menciuj (el la printempa n.ro 1963) artikolojn pri: La viva legendo pri la reĝimo de Saba, Submara esplorado, En du horoj trans Atlantiko, Karavano de amikeco. La revuo estas riĉe ilustrita.

R.

kohama kaj Tokio, kie li kaj 5 partoprenintoj en lia vojaĝ-grupo loĝis en tre bela kaj luksa hotelo. Li rakontis pri la diversaj kongresaranĝoj, kiujn li trovis perfektaj, ĉio funkciis glate. Aliĝis al la kongreso pli ol 1700 personoj, el kiuj proksimume la duono estis japanoj. Nia registaro estis reprezentita de R. Bugge-Paulsen, kaj C. Støp-Bowitz salutis la kongreson en la nomo de Norvega Esperantista Ligo. Sekvis la prelegon multaj belaj kolorlumbildoj pri Japanujo.

20/9. Post malfermo de la kunveno la prez. John Berggreen donis kelkajn informojn pri la UEA Migranta Ekspozicio kiun la klubo aranĝis de la 6. ĝis la 13. de septembro en la ejo ĉe Saga kinejo. La propaganda flanko estis tre kontentiga: 25 personoj aliĝis al la planitaj kursoj kaj unu mendis la korespondan kurson. Lernolibroj estis venditaj por kr. 346,10. Unu nova membro aliĝis al nia klubo. 250 vizitantoj subskribis la petskribon al UNO, kaj 78 partoprenis la demandkonkurson. 1000 informbroŝuroj estis disdonitaj.

Laŭ propono de Aase Gustavsen oni intencas havi malgrandajn lotumadojn dum la klubkunvenoj. Komencis per donaco de Aase Gustavsen de fruktokonfitaĵkulerero, kaj la unua lotumado donis la tre bonan rezulton de kr. 70,50.

La unua programpunkto estis saluto per sonbendo de Esperantogrupo en Bamberg, Germanio. La dua estis lingvoinstruado de Otto Prytz. Tre bone li klarigis al ni la misteran objektan predikativon, kiu post lia klarigo ne plu estos mistero.

«Mara Vento», Haugesund,

kunvenis unuafoje post la ferio la 16/9 en nova ejo. Bonvenigis la prez. esprimante la esperon ke la nova labor-sezono iĝu progresiva kaj fruktodona. — Antaŭ la ekpritrakto de la

Mortis John Bjørgum

tagordo la prezidanto faris memorparoladeton pri s.ano Didrik Mjøllhus, Karmøy, unu el la pioniroj de Esperanto en okcidenta Norvegujo, plenokora kaj sindona esperantisto, kies forpaso estas granda perdo al la movado kaj liaj multaj amikoj.

Klara Dahl raportis pri la distrikta kunesto en bela Hogganvik printempe, kaj poste la prez. rakontis pri la Nordlanda Esp.kongreso en Oslo kaj la jarkunveno de NEL. Priparolata estis la klub-laboro, funkciigo de studrondoj kaj ankaŭ la venontjara UK en Budapeŝto kaj ĉu Mara Vento aranĝu grup-vojaĝon. — Estis transdonataj salutoj venintaj al la klubanaro el eksterlandoj. Cetere oni kantis kaj vigle interbabilis.

La lasta antaŭferia kunveno okazis 31/5 en somerdomo privata en plaĉa apudfjorda loko. La kunvenon ĉeestis ankaŭ du jugoslavinoj, Mira Lupičar kaj Ines Trement el Ljubljana, krom ano el la klubo en Odda. — La prez. intervjuis Mira'n pri ŝia hejmlando kaj pri impresoj kaj spertoj el la feriovojaĝo ilia. La intervjuon ni surbendigis. Cetere ni multe kantis, pilkoludis eksterdome kaj diligente konversaciis kun la du simpatiaj vizitantinoj. Estis sukcesa vespero kiu forpasis en plej agrabla maniero.

La Urso, Sarpsborg,

kunvenis 16/9. Rosbach rakontis pri la laboro de la Akademio de Esperanto.

En la kunveno 30/9 okazis demonstrado pri la strukturo de Esperanto por invititaj gimnazianoj.

Distrikta sekretario de la santalmisio, John Bjørgum, Trondheim, forpasis la 9an de aŭgusto 1965. Li naskiĝis en Strinda la 5an de septembro 1886. Bjørgum diakoniĝis en 1910 kaj funkciis kiel diakono i. a. en Oslo, Hammerfest kaj Haugesund. Depost 1915 li estis distriktsekretario de la santalmisio, kaj post 50-jara servo li la 22an de junio ĉijare ricevis la Reĝan Meritmedalon.

Bjørgum esperantistiĝis jam en 1907 en Bergen pere de kurso kiun gvidis lektoro Einar Schibbye. Poste li i. a. partoprenis kurson de Ottmar Fischer en 1932 en Trondhejmo, kaj en 1953 li plenumis la elementan ekzamenon.

Bjørgum dum multaj jaroj estis membro de Grupo Esperantista de Trondhejmo, kaj la sciigo pri lia forpaso vekis funebbron ĉe ni ĉiuj.

Ripozu li en paco !

*Norsk Esperanto-Forbund
(Norvega Esperantista Ligo)*

Postadresse : Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradresse : St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon : 20 20 83

Kontortid : Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

*Esperantoforlaget A/S
(Eldonejo Esperanto A/S)*

Postadresse : Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Postadresse : St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon : 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A. :

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,

Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio :

Privata adreso de la ĉefredaktoro :

Johan Hammond Rosbach,

Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun

adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.

Telefona : 54 7 27